# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

N° 190 SEPTEMBRO 1996

La numero : 8FF Abono: 30 FF Kotizo: 10FF Sume: 40 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E= Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista )
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO.

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***



# Sommaire/*Enhavo*


Pages/*Paĝoj*

Le Mot du Président - *La bileto de la prezidanto* 3
Prière - *Preĝo* 5
Un saint français pour la Chine
*Franca sanktulo por Ĉinio* 6
Venue du Pape à Reims
*Alveno de la Papo en Reims* 8
La Consécration - *La Konsekrado* 10
Le mot du redacteur - *La vorto de la redaktoro* 12
Prière " Maman" - *Preĝo "Panjo"* 13
La mariage en escargot - *La helike serĉa geedziĝo* 14
Nouveautés - *Recenzoj* 15
Dans notre association - *En nia asocio* 16
Boite aux lettres - *Leterkesto* 17
Annonces - *Anoncoj* 18
Abonnements - *Kotiztabelo* 19


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/ *Sendinto*: PRIEURE SAINT-MARTIN
77 610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE


**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

La Houssaye en Brie (77)

LA HOUSSAYE EN BRIE 77 * P.P. *

# Surkovrile

La 22.an de septembro la Papo Johano Paùlo la dua alvenos en Reims , por celebri la 1500.an datrevenon de la bapto de Klodvigo kaj naskiĝo de Francio.
La 7.an de oktobro ekstartos ankaù la pilgrimo de la 108 Francaj Virgulinaj Statuoj , kiuj vojaĝos dum kvar jaroj tra la tuta mondo,kun alilandaj statuoj,kiuj reprezentas 150 landojn .

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aù tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio <u>nepre antaù</u> la 5.a de februaro,majo,aùgusto kaj novembro.

Finpresado la 02/09/1996

*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 190 Septembro 1996**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen
Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de la Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE
Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES
<u>Redakcio :</u>
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623,3022@Compuserve.com



# Le Mot du Président

C'est avec grand plaisir que je salue l'apparition de notre bulletin sous une forme renouvelée et agréable.Nul doute qu'il ne plaise à nos lecteurs et ne marque un progrès dans le développement de notre association.

M.Basso,notre nouveau rédacteur,est l'artisan de cette amélioration et nous devons tous le remercier pour le dévouement dont il fait preuve et l'aider en lui envoyant nos articles.Il les publiera volontiers.

Ainsi notre association prend un nouveau départ qui culminera lors de notre congrès à La Houssaye en Brie en mai 1997.Le programme est en cours d'élaboration et sera publié dans le bulletin de décembre.

L'année 1997 sera aussi celle du congrès international des espérantistes catholiques à Rome.Il convient que nous nous préparions dès à présent à cette manifestation de l'universalité de notre Foi et de notre langue.La Ville Eternelle nous attend et je suis sûr que vous serez nombreux à vous y rendre.

# La Bileto de la Prezidanto

Kun granda plezuro mi salutas la ekaperon de nia bulteno sub renovigita kaj agrabla formo.Sendube ĝi plaĉos al niaj legantoj kaj montros progreson en la disvolviĝo de nia asocio.

S-ro Basso, nia nova redaktoro, respondecas pri tia plibonigo. Ni ĉiuj devas danki al li pro la sindonemo, kiun li montras kaj helpi al li, sendante niajn artikolojn .

Li volonte publikigos ilin.

Tiel,nia asocio prenas novan starpunkton,kiu kulminos okaze de nia kongreso en La Houssaye en Brie, dum majo 1997. La programo estas ellaborata kaj oni publikigos ĝin sur la decembra bulteno.

La jaro 1997 estos ankaŭ tiu de la internacia kongreso de la katolikaj esperantistoj en Romo. Konvenas,ke de nun ni preparu nin al tiu manifestacio de la universaleco de nia Fido kaj de nia Lingvo. La Eterna Urbo atendas nin kaj mi estas certa,ke vi estos multnombraj por iri tien.

## Nova Bulteno,
## Nova sekretario,
## Nova prezidanto

Tiu renovigita bulteno estas la unua de nova serio. Sendube ĝi plaĉos al vi,dank'al la preskaŭ profesia lerteco de la nova redaktoro,kiu dum pluraj jaroj verkis la bultenon de sia paroĥo.

Same F-ino Chaney anstataŭas F-inon Preux,kiel sekretariino;ŝi estas kompetenta kaj daŭrigos la bonegan laboron de F-ino Preux,kiu dum pluraj jaroj donis sian tempon kaj sinoferon por akurate servi nian asocion.

Oni ankaŭ devos ŝanĝi la prezidanton kaj trovi posteulon al S-ro Bessière,kiu post naŭ-jara deĵorado deziras transdoni la torĉon al alia membro. La laboro ne estas streĉa kaj postulas malmulte da tempo.La kandidatoj ne atendu; ili tuj prezentu sian kandidatecon al la nuna prezidanto aŭ al la sekretariino.




# Karitato

Sinjoro Jesuo, sendita de la Patro
Por disdoni la Sanktan Spiriton al ĉiuj homoj,
Ni deziras elekti Vin
Por ke Vi igu nin kristanoj.

Ni donacas niajn piedojn
Por ke vi povu renkonti tiujn,al kiuj ni iros.
Ni donacas niajn manojn
Por ke Vi povu helpi ĉiujn,kiujn ni helpas.

Donacu al ni Vian amon; tio sufiĉas al ni.

El la revuo "Christ,Source de Vie "
(esperantigis A.B)



## Franca Sanktulo por Ĉinio

*La 2.an de junio 1996, en Romo, Papo Johano-Paŭlo la dua , kanonizis la beatulon Jean-Gabriel PERBOYRE (1802-1840) , filo de la diocezo de Cahors, lazaristo kaj martiro de la Kredo en Ĉinio, kie li iĝis la unua sanktulo.*

Tong Wien Siao, ĉina nomo de Jean-Gabriel Perboyre, estis filo de terkulturistoj, kiuj loĝis en Le Puech,vilaĝeto je 25 km okcidente de Cahors (46). En 1826, 24-jara,li pastriĝis kaj post dekjaraj studoj en Montauban kaj Parizo,la juna"Lazaristo" 1 foriris kiel misiisto en Ĉinio.

Lia vojaĝo daŭris ses monatojn de Le Havre ĝis Makao tra la India Oceano, kie li eltenis fortegan ŝtormon. Tie li lernis la ĉinan lingvon dum tri monatoj kaj poste aspektis kiel ĉino,kun lipharoj kaj razita kapo krom kelkaj haroj malantaŭe. Por atingi sian unuan mision en provinco de Fou-Kien, li marŝis kaj barkis pli ol 1500 km .

Dum lia kvarjara laboro por la Kongregacio de la Misio, li dediĉis sian tempon al organizo de la katolikaj komunumoj, unue en Makao poste en la regionoj Henan kaj Hubei. Sed la persekutoj kontraŭ la ksenofobaj konsekvencoj de la opia milito ekstartita en 1839 inter Ĉinio kaj Britio , estis fatalaj al li.

La religiulo estis denuncita de katekumeno . Oni torturis lin kaj poste li devis kuri kun bambuo fiksita sur sia dorso ĝis la krucforma pendejo, kie oni lin strangolis la 11.an de septembro 1840.

Papo Leono XIII.a beatigis lin en 1889.



1 Lazaristo: Kongregacio de la Misioj. Starigita de Sankta Vincent-de-Paul (1581-1660) en 1625 en la priorejo de Sankta Lazaro.


**AŬSKULTU RADIO VATIKANA**

Elsendoj en Esperanto :

DIMANĈE - Horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo (10')

Mezonde :527 kaj 1530 kHz

Kurtonde 4005(74.90 m),5880 (51.0m)

Satelite : Eutelsat II-F1,13 East,10.987 GHz,transponder 25, Video NBC Superchannel,subportanto 7.39 MHz FM,Panda 1,vertikala polarizado.

MERKREDE : Horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo (14')

Mezonde 1611 kHz,Kurtonde 6185(48.50m),7365(40.73m)

**Kaj skribu al : Radio-Vatikana - Esperanto Redakcio**

**SCV-00120 CITTA del VATIKANO**


*Mongolio :*

Unuafoje en la Historio, oni malfermis katolikan preĝejon en Ulan Bator. Post la malfermo de diplomatiaj rilatoj inter Mongolio kaj Vatikano, en 1992, tri misiistoj de Scheut-Kongregacio alvenis kaj komencis sian apostoladon.

<< Un sourire coute bien moins cher que l'électricité et donne plus de lumière. >>
(Abbé Pierre)



<< Rideto kostas ja malpli ol elektro kaj donas pli da lumo . >>
(Abato Pierre)

# Alveno de la Papo en Reims

La 22.an de septembro la Papo Johano-Paùlo IIa estos en Reims ...
REIMS 96: Francio rendevuas kun sia animo .

" Francio,unuenaskita Filino de la Eklezio,ĉu vi estas fidela je la promesoj de via bapto ? "
16 jarojn post tiu demando, Johano-Paùlo la dua revenas en Francion por la XVa jarcento.
Kiun respondon ni faros al la Sankta-Patro ?
Kia estos la spirita estonteco de nia lando ?

La pleneco de la vivo enhavas necese spiritan dimension, strebadon al senco donota al niaj individuaj kaj kolektivaj destinoj. Nu,ĉu estas mesaĝo pli forta,pli komprenebla kaj pli aktuala ol la mesaĝo pri Amo de Jesuo ?
**Antaù 1500 jaroj , Francio elektis Kriston .**
Gaùlo estis ŝirita de la invadoj,kiuj dispelis la Roman Imperion. La Bapto de Klodvigo estis la fonda akto de Francio,kiu lokis sian spiritecon sub la signo de Kristo. **Kiu spiriteco por estonta Francio ?**
"La XXI.a jarcento estos religia, aù ne estos" (A.Malraux).
Sojle de la tria jarmilo,Francio ĉiam estas kristana. Ĉu ĝi restos fidela al la promesoj de sia Bapto aù ĉu ĝi rezignos tiun heredaĵon,kiu estas fundamenta parto de ĝia identeco ?
La respondo dependas de ni ĉiuj.

La alveno de la Papo en Reims por celebri la datrevenon de la Bapto de Klodvigo, estas okazo al ni por pripensi niajn respondecojn kaj niajn engaĝiĝojn kiujn ni prenos por ke la



lando,kiun ni heredigos al niaj infanoj havu fortan spiritan vivon, fidelan al nia kristana heredaĵo .


## Kio estas tiu Konsekrado ?

Estas preĝo,per kio ni remetas solene niajn vivojn al Kristo, petante helpon de la Virgulino Maria por esti estontece pli fidela al nia Bapto.
Kial ĝin subskribi kaj sendi ?
Por montri al la Papo ke ni estas multegaj por respondi al li : "Jes! "
Tiuj engaĝiĝoj estos donitaj en Reims, poste ili estos konservitaj por ĉiam piede de la statuo de "Notre-Dame de France" , en Baillet (95) .

PREĜAJ INTENCOJ
POR SEPTEMBRO

Por ke la Eklezio sciu paroli al viroj kaj virinoj de ĉiuj kulturoj, en lingvo kiu kapablas malfermi la breĉojn en la koro.

(Aprobitaj de Johano-Paùlo II.a)



496-1996

**XVème Centenaire du Baptème de Clovis**

**"France,Fille aînée de l'Eglise, es-tu fidèle aux promesses de ton Baptême ?"**

**Oui,Saint-Père**

Nous voulons être des chrétiens fidèles pour vivre dans l'**Amour de Dieu** et de notre prochain,comme Jésus nous le demande.Nous voulons nous mettre à l'écoute du Christ et de son Eglise,pour porter l'Evangile dans nos familles,nos professions,nos cités, et jusqu'aux extrémités de la terre.

Nous voulons revenir vers Dieu qui est la source du vrai bonheur,pour construire un monde plus juste et plus fraternel.

Je veux pour ma part,répondre aujourd'hui à l'amour du Coeur de Jésus en m'engageant fermement à Le suivre,Lui qui est le Chemin,la Vérité et la Vie.

*" Ô Marie,Mère de Jésus,ma tendre Mère,je vous demande de m'aider dans cette résolution,aux côtés de tous les chrétiens de France.*

*Je confie à votre Coeur Immaculé ma famille,mes proches,mon pays et ma vie,pour que vous nous conduisiez sur le chemin de Dieu,qui est Père,Fils et Esprit-Saint, Amen . "*

Exemplaire à conserver pour dire la Consécration le 22/09/96 devant une statue de Marie, en communion avec tous ceux qui seront à Reims avec le Pape. La feuille verte ici insérée est à renvoyer , complétée par vos soins.



**496-1996**

**XVa Jarcento de la Bapto de Klodvigo**

**"Francio,unuenaskita Filino de la Eklezio, ĉu vi estas fidela al la promesoj de via Bapto ?**

**Jes, Sankta-Patro**

Ni volas esti fidelaj kristanoj por vivi en la Amo al Dio kaj al nia proksimulo, kiel Jesuo nin petas.Ni volas nin meti en la aùskulto de Kristo kaj de sia Eklezio,por porti la Evangelion en niaj familioj, niaj urboj,kaj ĝis la ekstremoj de la tero.

Ni volas reveni al Dio, kiu estas fonto de la vera boneco, por konstrui pli justan kaj fratan mondon.

Mi volas miaflanke, respondi hodiaù al la amo de la Koro de Jesuo,min firme devontigante Lin sekvi, Li, kiu estas la Vojo, la Vero kaj la Vivo.

*<< Ho, Maria, Patrino de Jesuo, mia tenera Patrino,mi petas Vin helpi min en tiu rezolucio, flanke de ĉiuj kristanoj de Francio. Mi konfidas al via Senpeka Koro mian familion, miajn proksimulojn,mian landon kaj mian vivon,por ke Vi konduku nin sur la vojo al Dio, kiu estas Patro, Filo kaj Sankta Spirito. Amen . >>*

*Konservota ekzemplero por diri la Konsekradon la 22.an de septembro 1996 antaù iu statuo de Maria, komunie kun ĉiuj, kiuj estos en Reims kun la Papo. Bonvolu plenigi,subskribi kaj resendi la ĉi-kune aldonitan verdan folion.*

## La vorto de la Redaktoro :

Estimataj legantoj,

Mi esperas, ke tiu novtipa bulteno plaĉos al vi. Mi faros laù miaj eblecoj por kontentigi Vin, kaj restos je via dispono por rivevi plibonigajn ideojn por la bulteno kaj nia asocio. Artikoloj estos bonvenaj.
Mi gratulas mian antaùulinon S-ino Jeannine Vincent, kiu redaktis nian bultenon jam de 28 jaroj !!! kaj dankas ŝin pro la korekto de nunaj bultenoj.
Ni sekvu kune la Vojon de Kristo . Frate Via .

Via redaktoro

Pri mi mem: Mi estas 33-jara, konstrua entreprenisto. Lastjare Dio donacis al mia edzino Marie-Jeanne ĉarmajn ĝemelojn , Lino kaj Luca . Do ne mankas laboro en nia familio !

Mi dediĉas ĉi-tiun unuan novtipan bultenon de nia asocio al Nia Sinjorino de la Espero, Protektantino de la Esperantistoj, al ĉiuj viaj forpasintaj patrinoj kaj al mia patrino, kiu translokiĝis al ĉielo antaù kelkaj monatoj post suferiga malsano .





## Panjo,



*Comme Dieu ne voulait pas faire tout seul, il créa les mères*

Ni tiel multe vin amis,
Vi kiu estis tiom feliĉa vivi
kun tiuj ,kiujn vi amis,
Vi kiu estis tiom feliĉa
fari servon al ĉiuj,
Vi kiu estis diskreta
sed ĉiam ĉeestanta,
Vi kiu ĉiam apogis nin
en humanismaj kialoj,
Akceptu ŝin, Sinjoro, en via domo.
Ne lasu nin solajn en la fundo de nia tristo.
Helpu nin akcepti la malplenecon fositan en ni.
Vi kiu tiel amus vidi la kreskadon de viaj nepoj.
Ili estas ĉi-tie, en niaj vivoj, en niaj koroj,
kiel la lasta donaco, kiun ni povas donaci al Vi.
Apogante nin unu la aliaj,
kun fido al la vivo,ni daùrigas Vin ami,
kaj gardos vin ĉiam inter ni.

Viaj tri infanoj ,

Amen.

Kiel infano interne de sia patrino, homo ne konas alian mondon ol tiun en kiu li vivas.
Kiam infano foriras el la patrina sino, li hurlas pro timo. poste li ekkonas la vizaĝon de sia patrino.
La homo nomas tion : naskiĝo .
Kiam venos la tago de nia morto, ni tremos .Dio nomos tion : naskiĝo por eterno . Ni finfine konos lian vizaĝon
.

## LA HELIKE SERĈA GEEDZIĜO

Kiam,post iom da tempo da komuna vivo,Ĵak kaj Maria-Noela decidis geedziĝi,ili unue zorgadis pri trovado de akceptsalono. Ili serĉis rondirante ĉirkaŭ Parizo:ju pli la distanco estas granda,des malpli kara la prezo. Ili do fine trovis nobeldomon kongruantan kun ilia gusto kaj buĝeto. Ili rezervigis salonon rilate la lokan disponeblecon: tiel la ceremonia dato estis decidita. Poste, ili serĉis preĝejon,deirante de tiu loko, ili denove helike progresis por eltrovi la romanikan preĝejon, kiu konformiĝis al ilia gusto.Tiam sufiĉis,ili opiniis,trovi la lokan parohestron kaj komuniki al li la horon kaj daton. Ve ! ili ekkomprenis,ke la parohestro,kiu loĝas en la ĉefurba najbara kantono,havas agendon tre ŝarĝitan: " Junuloj,mi bonvolas pruntedoni al vi mian preĝejon,sed vi devas peti de via pariza parohestro,ke li venu por celebri vian geedziĝon. Ĉiel,vi devas renkonti lin por la necesa preparado.

Tute mirigitaj, ambaŭ fianĉoj malkovris,ke ili devas kontakti kun sia domicila paroho.Reveninte en la helikan centron,ili sin turnis al sacerdoto,kiu bonvole akceptis prepari ilin al ilia promeso,sed kiu konigis al ili sian propran agendon tre plenigitan sabate kaj rifuzis veturi je 60 kilometroj por celebrado: "Venu do celebri vian geedziĝon ĉi-tien,en vian parohon !" Tiam la fianĉoj ekkoleris,ili havis precizan postulon: celebri sian geedziĝon en la kamparo kaj ili fermklakis la pordon; ili supozis, ke ili facile trovos sacerdoton ,kiu kompreneble moviĝos posttagmezan sabaton. Kelkajn tagojn poste,ili revenis tutkonfuzitaj kaj akceptis la komencan proponon: ilia religia geedziĝo okazos en Parizo, poste la tuta ĉeestantaro veturos al la domego.

Oni komprenas la esprimon "distribuanto de sakramentoj" , kiun iuj sacerdotoj antaŭigas por esprimi,kion ili ne deziras fariĝi ! Ni klopodas rekunigi la aspirojn, la atendojn de multaj junuloj; la preparado al geedziĝo estas okazo dialogi plej proksime al la esploroj,al la demandoj de tiuj gejunuloj, kiuj ofte evidentigas grandan kordisponeblecon.

Sed ni ne povas jesi je ĉiuj atendoj: eniri en sistemon de konsumado,en kiu oni atendas de sacerdoto,ke li faros vendan komplezon kongruan al la gusto de la kliento,ne respondas al nia pastra alvokiĝo.

Patrice Vivarès , pastro

Eltirita el "LA CROIX 16/04/96 "

tradukita de Marcel Colleu



# RECENZOJ

## Aperis la "Lettre de Taizé '96 " en esperanto :

La komunumo de Taizé estas ekumena frataro; ĝi gastigas homojn el la tuta mondo,ĉefe gejunulojn- somere ĉe si en Francio, kaj dum la novjara semajno en iu eŭropa urbo : 1990 en Prago,1991 en Budapeŝto,1994 en Parizo,1995 en Wroclaw .. Al ĉi tiu aranĝo kutime venas kelkaj dekmiloj da homoj. Okazas meditecaj diservoj,diskutrondoj pri bibliaj temoj ktp. En la somero la programo estas principe la sama.Ĉeestas -depende de la sezono- inter cent kaj kelkmil homoj samtempe; ili normale restas unu semajnon.
La vilaĝo Taizé, kiu plejparte konsistas el la Komunumo, situas en Burgonjo, inter la urboj Dijon kaj Lyon.

Ĉiujare aperas letero skribita de Frato Roger, fondinto de la Komunumo en 59 lingvoj . En 1996 ĝi ankaŭ aperis por la unua fojo en esperanto .(4 paĝoj Formato A4 ) .

Venonta internacia renkontiĝo okazos en Stuttgart (Germanio) de la 28.12.96 ĝis 01.01.97 . En tiu renkontiĝo ariĝos ankaŭ esperantistoj . Baldaŭ aperos oficiala aliĝilo en esperanto por la unua fojo, sed esperantistoj jam partoprenis en la renkontiĝo de Budapeŝto en 1991 .

Partoprenontoj bonvolu informi :
S-ro Reinhard Pfluger
Hermannstr. 3
D-60318 FRANKFURT (Germanio)
aŭ la redaktoro ( adreso p. 2)

## Tra la franca gazetaro :

En "Famille Chrétienne" Numero 964 de la 4.a de julio 1996 en la suplementaj paĝoj "Présences" aperis anonco pri la IKUE-Tendaro en Ĉehio "Camps Esperanto " .

## EN NIA ASOCIO

Nia sidejo translokiĝis ĉe : F-ino Chaney Anne-Marie
56,Rue Corvisart
75 013 PARIS

Tiu informo aperis en la Oficiala Gazeto la 3.an de julio 1996 paĝo . 3213 . Artikolo: 1677 .

MEMBROJ I.K.U.E 1996 (5-a Listo)
22.S-ro PONS Roger 23.S-ro BINCHE Marc 24.S-ro PETIT Yves 25. S-ro FARDET Robert 26. Ges-roj LANDRIN Daniel 27.F-ino GOUDE Madeleine 28. S-ino RAVENSTEIN Simone 29.S-ro DESPINEY Roger .

### Ni funebras kaj kondolencas .

**Forlasis nin ĉi tiuj niaj gefratoj :**

- **S-ro Jacques Lecroisey (Majo 96)**
  Li estis fervora katoliko kaj senlaca aktiva propagandisto de la internacia lingvo.
- **S-ro Giovanni De Salvo (10.4.96)**
  Patro de la Prezidanto de IKUE
- **S-ino Basso Yvonne (29.3.96)**
  Patrino de la redaktoro (61-jara)

***Al la familioj, sinceraj kondolencoj. Ni preĝu por la ripozo de la animoj de la forpasintoj.***



## LETERKESTO

*" ....Mi ĝojas,ke ni baldaŭ ricevos iom pli bonefaritan bultenon. Mi esperas,ke la venontaj voĉdonmaterialoj estos sur speciala sendorsa paĝo,por ke mi ne detruu mian (konservitan) bultenon.Mi sendas plian monon speciale por plibonigi nian legadon kaj kuraĝigi la redaktoron ! " Marto 96 (JP.A)*

Koran dankon pro via ideo kaj kuraĝigo. En tiu bulteno,ni jam spertis vian ideon per la Konsekrado . Ĉu estas bone tiel ? (La redaktoro)

*" .. Mi legis en "Famille Chrétienne" la avizon pri la Esperanto-Katolika Kampadejo en Ĉehio. Gratulon por la iniciato.Ve, estas iome malproksima por francaj infanoj ..." Vosges - Julio 96 - (D.D)*

Fakte Ĉehio estas malproksima .Sed la prezo tre interesa , nur 320 Frankoj por dusemajna restado en tendaro kun manĝoj. Ŝajnas ke en Francio ne okazas tiuj E-katolikaj tendaroj, kiu scias pri tio ?
Atingis min 5 leteroj post la artikolo en "Famille Chrétienne" .Eble du aliĝos al nia asocio ?

KIU RUBRIKO INTERESUS VIN ?
SKRIBU !

# ANONCOJ

**01**


Ekde julio de pasinta jaro juna urso vekiĝis el multjara dormado.Estas IKUEJ ( Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista Junulara) . Do gejunuloj aliĝu ĉe :
F-ino Anna Nemcova, Zvolenska 5, SK - 01008 Zilina (Slovakio)

**02**

La paroĥo de Wintzenheim(68) kaj ĝia paroĥestro pastro François Menny , helpas al konstruado de greka-katolika preĝejo en Rumanio proksime Baia-Mare . Ventontjare estas organizata franca skipo por fini la laborojn dum du semajnoj . Alia turisma programo tra Rumanio estas organizata por la aliaj. Informoj: ĉe la redaktoro

**03**

Proksime MULHOUSE (68) ĉiujare okazas forumo : " CHRETIENS SANS FRONTIERES " . Eble nia asocio povus partopreni . Mi povus aranĝi malgrandan standon . Ĉu vi havas ideojn pri la enhavo koncerne la temo ESPERANTO kaj KRISTANISMO ? Kion mi povus ekspozicii ? ( La Redaktoro) .



# Libroservo

Prezo en francaj frankoj por membroj de A.C.F.E:
Konto :
Association Catholique Française pour l'Espéranto C.C.P. ROUEN 2 324 93 N

| | |
|---|---|
| Letero de TAIZE 1996 en esperanto (4p.A4) (aŭ poŝtmarko al la Redaktoro ) . | 3 F |
| Faldkarto pri Sankta-Odilia aŭ Kristo | 15 F |
| Roma Meslibro en Esperanto (2 volumoj) | 460 F |
| Franca libro "Archevêque et laveur de vitres " biografio de kardinalo Miroslav VLK | 80 F |
| Vidkasedo : La Mortotuko 55 mn | 220 F |

# Kotiztabelo 1996

| | |
|---|---|
| I.K.U.E kun "Espero Katolika" | 140 F |
| Peranto : S-ro M. COLLEU<br>95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES<br>P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE . | |
| A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto" unuopulo : | 40 F |
| geedza paro : | 50 F |
| infano ĝis 16-jara,pastro,religiu(in)o : | 20 F |
| bonfaranto : | 200 F |
| U.F.E kun Revue Française" kaj "E° Actualités" : | 280 F |
| U.E.A kun "Esperanto" kaj Jarlibro : | 300 F |

Dépot légal : 3ème trimestre 1996 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE
Directeur délégué: Michel BASSO